# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-23 n-ro 364


# Nombro de mortintoj pro bombatako en Niĝerio kreskis ĝis 50



Fino de la portempa statuso por la Haitianoj setlintaj en Usono

Zimbabva prezidento Robert Mugabe deklaris demision

La naturo rekonstruas arbarojn pli efike ol la homoj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

## Nombro de mortintoj pro bombatako en Niĝerio kreskis ĝis 50
*En moskeo en Kunu Araha p. 03*

## Ĉefo de UN kondamnas sinmortigan atakon en Niĝerio
*Reasertis la solidarecon de la UN p. 03*

## Fino de la portempa statuso por la Haitianoj setlintaj en Usono
*Preskaŭ 60 000 Haitianoj p. 04*

## Zimbabva prezidento Robert Mugabe deklaris demision
*Formale prezentis sian rezignon p. 05*

## Pola urbo sendis donacon al Tom Hanks
*Aŭtomobilo "Fiat 126" p. 05*

## La naturo rekonstruas arbarojn pli efike ol la homoj
*Homa klopodo por rearbarigo kostas inter 1 400 kaj 34 000 dolarojn por ĉiu hektaro p. 06*

## Pollando avanas en la Unio, enmigrantoj-2016
*Enmigrantoj akceptitaj en 2016 p. 07*

## Hodiaŭe
*Japanio p. 07*

## Zamenhof-ekspozicio en la koro de Kaŭno
*Ekde la 15a de novembro p. 08*

## Nombro de mortintoj pro bombatako en Niĝerio kreskis ĝis 50

Loka polico diris, ke la nombro de mortintoj pro sinmortiga bombatako marde [21 nov 2017] matene en loka moskeo en la nordorienta niĝeria urbo *Mubi* kreskis ĝis 50.



Othman ABUBAKAR, proparolanto de la polico, diris al raportistoj, ke la frumatena atako estis farita de nekonata adoleskanto. Li eksplodigis la sinmortigan veŝton, kiun li portis al la moskeo en *Kunu Araha*, antaŭurbo de *Mubi* en la norda ŝtato *Adamawa*. Oni jam konfirmis 50 mortintojn, kaj nun ili provas akiri la precizan nombron de la vunditoj.

La adoleskanta atakanto eksplodigis la bombon tuj post la preĝo en la loka moskeo. Vidintoj diris al la novaĵ-agentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè], ke la pleparto de la vunditaj viktimoj estas en kriza stato.

Neniu grupo ĝis nun deklaris respondecon pri la bombatako, sed la sekurecaj aŭtoritatoj kaj lokanoj suspektas, ke terorisma grupo *Boko Haram* efektivigis la atakon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Ĉefo de UN kondamnas sinmortigan atakon en Niĝerio

Ĝenerala sekretario de la UN António GUTERRES marde [21 nov 2017] kondamnis la sinmortigan bombatakon en Niĝerio, kiu mortigis grandan nombron da homoj.




En la deklaro publikigita per lia proparolanto Farhan HAQ, Guterres esprimis siajn kondolencojn al la familioj de la mortintoj kaj al la registaro kaj popolo de Niĝerio pro la perdo de vivoj, kaj deziris rapidan resaniĝon al la vunditoj. Li vokis rapide alporti homojn respondecajn pri tiuj abomenindaj agoj al la justeco.

HAQ diris, ke GUTERRES reasertis la solidarecon de la UN kun la Niĝeria registaro en ĝia batalo kontraŭ terorismo kaj perforta ekstremismo, kaj ripetis la promeson de la UN subteni plu regionajn kontraŭterorismajn iniciatojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia




# Fino de la portempa statuso por la Haitianoj setlintaj en Usono

La administracio de TRUMP anoncis lundon la 20an de novembro 2017, ke ĝi ne renovigos la programon starigitan en 2010, kiu ebligis al preskaŭ 60 000 Haitianoj restadi kaj labori sur la usona teritorio. La koncernataj personoj devos forlasi la landon antaŭ la fino de julio 2019.

Laŭ la Departemento de Usona enlanda sekureco, la vivkondiĉoj en Haitio sufiĉe pliboniĝis, kaj la profitantoj de la statuso de portempa protektado povas rehejmiĝi.

La federalaj aŭtoritatoj tamen akordas prokraston al la Haitianoj por organizi sian revenon: la forlasontoj disponas pri 18 monatoj por forlasi la landon.

La portempa statuso estis akordita al la Haitianoj fare de la administracio OBAMA post la tertremo de 2010. Ĝi estis de tiam regule renovigita.

Laŭ studaĵo de la Agentejo pri la migradoj, plimulto de la Haitianoj, kiuj profitas de tiu statuso, alvenis en Usono antaŭ la tertremo, antaŭ averaĝe 13 jaroj.

Tiel, ĉirkaŭ 27 000 usonaj infanoj naskiĝis de haitiaj gepatroj profitantaj de tiu statuso. Iliaj gepatroj, kiuj ne akiros la usonan naciecon antaŭ la fino de julio 2019, riskas do forpelon.

Plejparto de la koncernataj personoj loĝas en Florido, kaj la lokaj elektitoj el ĉiuj politikaj partioj agadis favore al renovigo de ilia restadrajto.

La decido de la Usona administracio tamen surprizis neniun. Multaj Haitianoj profitantaj de la statuso anticipis ĝin, kaj antaŭnelonge migradis al Kanado, en la espero setli tie pli daŭre.

Neniam Milito Inter Ni

# Zimbabva prezidento Robert MUGABE deklaris demision

MUGABE diris en sia rezigna letero, ke laŭ la Zimbabva Konstitucio li formale prezentas sian rezignon pri zimbabva prezidenteco kun tuja efiko.



Li diris, ke lia decido pri rezigno estas memvola pro lia kaŭzo kaj rezulte el lia zorgo pri la bonfarto de la zimbabva popolo kaj lia deziro certigi mildan, pacan kaj neperfortan transiron de potenco, kiu subtenas nacian sekurecon, pacon kaj stabilecon.

Lia rezigno estis anoncita de parlamenta prezidanto Jacob MUDENDA marde [21 nov 2017] dum komuna kunveno de Senato kaj Nacia Asembleo, kiu debatis pri la mocio eksigi lin. MUDENDA tuj anoncis interrompon de la debato kaj diris, ke li tuj komencos taŭgajn leĝajn procedurojn por instali novan prezidenton de la lando ne pli malfrue ol la fino de merkredo [22 nov 2017].

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Pola urbo sendis donacon al Tom HANKS

Fine de la pasinta jaro en la pola urbo *Bielsko-Biała* [ˈbʲɛlskɔ ˈbʲawa] aperis ideo fari donacon de iu aŭtomobilo "*Fiat 126*" al la usona aktoro Tom HANKS, post ties afiŝo de foto je la 29 de oktobro 2016 en Tvitero, en kiu tiam en Hungarlando, li estis pozanta ĉe tia malgranda aŭto kaj esprimanta sian ŝaton pri ĝi.




Tiu "*Fiat 126*" estas tre popolara en Pollando, tie ĝi estas konata kiel "*Maluch*" (etulo), kaj dum jardekoj ĝi estis produktata en la urbo *Bielsko-Biała*. La donacota unuo estis aĉetita komence de 2017, kaj de tiam ĝi estis rebonigita por fine forveturi (lunde la 20-an de novembro) al Varsovio, de kie ĝi venos aviadile al Los-Anĝeleso (Usono), la loĝloko de Tom HANKS.

Al la novaĵagentejo EFE la proparolanto de tiu iniciato, Monika JASKOLSKA, diris: "Ni decidis profiti de tiu okazo por donaci la unuon de Fiat, kiel maniero diskonigi la historion de Pollando kaj nia urbo".

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# La naturo rekonstruas arbarojn pli efike ol la homoj

Dum la lastaj jaroj, bela iniciato aperis en tropikaj landoj, kie senbrida, sovaĝa detruado de naturaj arbaroj okazas jam de jarcentoj. Kompreneble, la konsekvencoj de tia detruado estas katastrofaj por la medio kaj klimato. Multaj bonintencaj homoj do sin dediĉas al replantado de arboj en tiuj regionoj. Fakte, en iuj lokoj, nenia alia rimedo ekzistas, krom la pacienca, longa laboro, kiu jam rikoltis bonegajn rezultojn. Tamen, replantado de arbaroj fare de homoj estas multekosta kaj peniga afero.



Antaŭ ne longa tempo, brazilaj esploristoj publikigis studaĵon en la revuo "Science Advances" pri tiu temo. Analizinte pli ol cent esplorojn publikigitajn en la mondo pri la restarigo de arbaroj, ili konstatis, ke plej ofte la homa interveno estas malpli efika ol naturaj procesoj de rearbarigo. La zorga revizio de la rezultoj ricevis apogon de sciencistoj de diversaj universitatoj kaj aliaj institucioj en Brazilo kaj eksterlande. Se oni permesas, ke la naturo mem agadu, tiam la rearbarigoj okazas pli komplete, sane kaj malmultekoste, ol se homoj aktive intervenas – ili asertas. Homa klopodo por rearbarigo kostas inter 1400 kaj 34000 dolarojn por ĉiu hektaro, depende de loko kaj metodo.

Valoras la penon fari tion, sed ne estas facile trovi rimedojn por tio. Tamen, rilate la restarigon de viv-diverseco, la natura metodo estis supera je 34 ĝis 56 procentoj. Rilate la vegetaĵaron de la rekreata arbaro, la natura metodo estis supera je 19 ĝis 56 procentoj.

Kompreneble, la homaj klopodoj mem restarigi arbarojn estas tre meritoplena, ĉar ne ĉiam la naturo mem sukcesas plenumi tion. Tio dependas de la loko, de pluvo kaj de la grado de detruado. La sciencistoj rekonas, ke en certaj situacioj, la sola ebleco estas la homa interveno. En aliaj, plej prudente estas simple ĉirkaŭbari la rekonstruotan areon, por ne permesi, ke brutoj tretu la grundon aŭ ke homoj malhelpu la laboron de la naturo.

Bienistoj kaj farmistoj devus esti stimulataj rezervi parton de sia tero por rekonstruado de naturaj arbaroj. Afero iom pli simpla kaj malmultekosta, en iuj regionoj. Kaj la tuta mondo dankus tian iniciaton!

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio

# Pollando avanas en la Unio, enmigrantoj-2016

Laŭ la donitaĵoj de *Eurostat* Pollando okupas la 2-an lokon en la Unio laŭ la vidpunkto de enmigrantoj akceptitaj en 2016. Anticipas nian landon Britio, sed inter la venantaj tien enmigrantoj plej grandan grupon konsistigas usonanoj.




Pollando eldonis plej multe da t.n. bazaj restad-rajtigaj dokumentoj lige kun laboro por eksteruniaj civitanoj. Temis pri 585 900[kvincent okdek kvin mil naŭcent]. Tio estas pli ol Germanio – 504 mil kaj duoble pli ol Francio – 235 mil. En statistiko Pollandon antaŭas Britio kun 865 900 enmigrintoj el inter kiuj 183 800 estis usonanoj. Inter enmigrintoj akceptitaj de Pollando 512 500 estis ukrainianoj.

Laŭ donitaĵoj de *Eurostat* Pollando okupis la unuan lokon laŭ la vidpunkto de dokumentoj donitaj al eksterlandanoj lige kun la deziro entrepreni laboron. Temas pri 58 procentoj de ĉiuj Eŭropuniaj permesoj ligitaj kun laborcela enmigrado. Plej multajn permesojn lige kun la studdeziro eldonis Britio. En Pollando plej multajn permesojn pro la studdeziro ricevis ĉinoj. En la ceteraj Eŭropuniaj landoj dominas portempaj estadpermesoj ligitaj kun la familimotivoj.

Pola Retradio



## Bildo de la tago

**Turo de *Inui-yagura*, gardanta la eksteran fosaĵon de la Kastelo de *Osaka*, Japanio.**

**Vikipedio**

# Zamenhof-ekspozicio en la koro de Kaŭno

Ekde la 15a de novembro la ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof, preparita de la Pola instituto en Vilno kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj dediĉita al la centa mortodatreveno de la kreinto de Esperanto, translokiĝis al la plej prestiĝa kaj honora loko de Kaŭno – la historia Urbodomo.




La solenan inaŭguron partoprenis ĉ. 50 personoj – esperantistoj kaj neesperantistoj, inter kiuj estis kelkaj gravuloj de la urbo, ekzemple Laimonas Inis kaj Juozas Kundrotas, prezidanto de la Litovia asocio de libroamantoj Dalia Poškienė, direktoro de la Monda centro de litovoj pri kulturo, scienco kaj edukado [klerigado] Valdas Kubilius, delegito de al Internacia asocio de verkistoj kaj publicistoj kaj prezidanto de la Rusa literatura klubo “G. Derĵavin” en Kaŭno Galim Sitdykov, pentristo Vladimiras Beresniovas, kelkaj ĵurnalistoj.

Enkondukan paroladon dum la inaŭguro faris la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. Li substrekis, interalie, ke Ludoviko Zamenhof estas dece honorita en Litovio – estas du monumentoj omaĝe al li (ambaŭ en *Veisiejai*), tri stratoj estas nomitaj per lia nomo (en *Veisiejai*, en Kaŭno kaj en Vilnio), en la litova lingvo estas eldonitaj entute ses biografiaj libroj (tradukitaj el aliaj lingvoj kaj originale verkitaj) pri Ludoviko Zamenhof (ĉiuj en la lastaj 15 jaroj; tiu de Vytautas Šilas *Zamenhofas istorinėje Lietuvoje* aperis en la nuna Zamenhofa Jaro). En Kaŭno konserviĝis la domo de Aleksandro Zilbernik, kie nun funkcias la sidejo de LEA.

Kaŭno estas la tria urbo en la mondo (post Bjalistoko, kie li naskiĝis, kaj post Varsovio, kie li multajn jarojn vivis), kiu grave influis la vivon de Ludoviko Zamenhof. Ĝuste en Kaŭno li trovis amikinon de la vivo, ĝuste Kaŭno ebligis al li eldoni la unuan lernolibron de Esperanto, kaj dum multaj jaroj lia bopatro kaŭnano Aleksandsro Zilbernik financis multajn liajn verkojn kaj laborojn.

Ĉiuj estis invititaj pli profunde studi la buntan personecon de Ludoviko Zamenhof kaj lian verkaron, kiu estas tre abunda – ja Zamenhof estis profunda humanisto, kaj liaj interesoj estis tre vastaj, multfacetaj kaj diversflankaj.

Ankaŭ la direktoro de la urba muzeo Gabrielius Sužiedėlis parolis pri la ligoj de Zamenhof kun Kaŭno kaj traktis lin kiel unu el la plej gravaj homoj, kies sorto estas tiel forte ligita al tiu litova urbo.

Sekvis trarigardo de la ekspozicio kaj neformalaj konversacioj ĉe la glaso de vino.

La inaŭguro per gazetara komuniko estis anticipe anoncita en preskaŭ ĉiuj amaskomunikiloj de Kaŭno kaj en kelkaj tutlandaj gazetoj kaj retejoj. La ekspozicio daŭros ĝis la jarfino. Ĝin povos spekti ankaŭ partoprenantoj de la 53a kongreso de LEA kaj Zamenhof-Tagoj-2017, kiuj okazos la 9-10an de decembro en Kaŭno. Poste ĝi translokiĝos al la Kaŭna universitato Vytautas La Granda. Ekde marto 2018 ĝi komencos rondiradon tra ĉiuj litoviaj urboj.

Povilas Jegorovas
La Balta Ondo